

Esencaj ideoj pri projekto por novtipe laŭ-tema vortaro

Michele Mariano (Italio)*

Ek de la komenco, mi kredas inde reliefigi, ke tiu-ĉi verko prezentas leksikografian metodon aplikeblan ne nur al Esperanto, sed al ĉiuj lingvoj kun ajna strukturo, inter kiuj ĝi povas funkcii kiel tre taŭga komparilo.

La lingvo konsistas el vortoj, esprimantaj nociojn, kaj el ideoj, esprimataj de la vortoj mem. Ofte okazas, ke oni devas serĉi, inter la multego de la unuj aŭ de la aliaj, la elementon respondan al tiu, de kiu ĝi estas reciproka; sed dum la vortoj havas siajn kolektojn en la vortaroj alfabete ordigitaj, kiuj montras flanke ilian signifon, la nocioj ne havas analogan rimedon, se oni serĉas la vorton al ĉiu respondan. Tamen tio estus ne malofte tre utila por ilin kompari kaj do por elekti la vorton plej taŭgan por esprimi la celatan ideon.

Ĉar la demando montriĝas aparte grava en iuj kampoj, la rilata bezono jam estigis provizoran rimedon en pluraj okazoj: la urbaj planoj pare kun la listo de la vojoj, la “flavaj paĝoj” de la telefona gvidilo, la sliparo laŭobjekta de la bibliotekoj, la klasado de la naturaj sciencoj k.t.p.

Ankaŭ por apartaj aspektoj de la lingvo aperis verkoj oportunaj, ĉiel ekzemple la vortaro *DUDEN*, kiu prezentas tre vastan kaj precize ilustritan nomenklaturon de objektoj, kaj aliaj analogoj. Sed, certe, neniu el tiuj verkoj proponas al si la solvon de tiu problemo **entute**, ĉar mankas al ili ekz. ĉiuj gramatikaj morfemoj, la substantivoj abstraktaj, la adjektivoj kaj la verboj, kiuj konsistigas ĝuste la plej malfacilan parton de la tasko.

Nu, konsiderante kiel **principa** la naturan “kuntrenadon de la ideoj”, aperas kiel logika konsekvenco ilin prezenti sintezitaj en tiom da “kampoj semantikaj” (t.e.: regionoj de signifoj), kiuj individuigu respondan nombron da tem-tabeloj, enhavantaj ĉiu sian aron da sinonimoj, rilatantaj al unu sama temo. Laŭrande al tiuj tabeloj ni metos ties ĝeneralajn difinojn, kiuj enkadrigos la enhavon.

Parolante pri la difinoj, mi emus fari tie-ĉi oportunan rimarkon. Ni konstatas, ke la plej bonaj vortaroj tre zorgas por ilin esprimi klare kaj precize; fakte, ilia evidenteco estas malofte superebla. Sed ilia dissemiĝo intermita laŭlonge de la linia ordo alfabeta similas al tiu de palislanternoj borderantaj kamparan straton: ilia individua lumado estas sendube efika, sed nemulte foratinga pro ilia izoliteco. Tre pli grandan brilon ni ricevus, dislokante tiujn lumigilojn simetrie ĉirkaŭ placo aŭ salono; tiel ilia lumigo koncentriĝus preciproke kaj la efiko estus intensa.

* diplomito en kompara lingvistiko, nun pensiita funkciulo el industrio.

Analogan rezulton ni havus dislokante la difinojn simetrie, ĉu laŭlonge al eksteraj flankoj de la tabelo, ĉu interne al ĝi, formante gradecon; tiel la kampoj semantikaj de ili prezentataj aperos kvazaŭ “sekciantaj” en sia konsisto kaj sekve pli facile kaj logike analizeblaj.

Tiel la vortaro, anstataŭ aperi — kiel la alfabeto — nur senfina linia listo da nocioj, prezentos bone difinitan (aŭ almenaŭ difineblan) serion da tabeloj, el kiuj ĉiu priskribas ideon pli-malpli ĝeneralan, kun la amplekso, per kiu oni volas laŭbezone prezenti la ideon mem, tiel rilate al ĝia graveco, riĉeco je sinonimaj signifoj, k.c. kiel rilate al la amplekso, kiun oni volas doni al la verko eldonata.

Evidente, tiu procedo ja tute similas al la geografia, sed la kombino de la semantiko kun la kartografia tekniko unua-vide aperos al la lingvistoj kiel iom nenatura, ĉar la objektoj estas inter si tiel diversaj. Tamen mi rimarkigas: “Kiom da fojoj, ĝuste la oportuna kombinado de ideoj **ŝajne inter si foraj** sin montris poste fekunda je rezultoj?

Kaj, unu avantaĝon precipan ni havas jam el tio, ke — prezentante la tutan idearon laŭ disdivido logika (ne filozofie, sed konkrete!) — ni havas ordon komunan por ĉiuj lingvoj, nur ŝanĝante — same kiel la geografio — ĉiuokaze la rilatan naturlingvan esprimon. Ja mi ne kredas naive tiel solvi la tutan problemon tradukan! Mia, kvankam tre modesta, lingva sperto devige min konsciigas pri la objekte grandaj malfacilaĵoj, kiujn tiu problemo praktike prezentas, ekzemple pri la abstraktaĵoj; sed tiom pli prave mi povas aserti, ke la sintezado de la ideoj helpas ege la komparadon kaj la elekton.

Estas ankaŭ notinde, ke tiu ordo universala igos la tabelan vortaron analoga (kiel la *DUDEN*) en ĉiuj lingvoj; kaj tio anstataŭos ĉiujn vortarojn “tradukajn” du- aŭ plurlingvajn, ĉar en ĉiu okazo sufiĉos la paro tabela-alfabeta, normale kunigata en ununura volumo.

Ĉar la celo de tiu-ĉi verko estas faciligi kiel eble plej la serĉadon de iu ajn ideo, al kiu oni volus trovi la respondan esprimon, unue vi trovos en la vortaro alfabeto raportilon al la tabelo, entenanta tiun ideon (kiu raportilo, cetere, kun la sperto akirata, fariĝos nebezona): kaj due, la tabelvortaro prezentos, kiel la geografia maparo aŭ la fervoja foliaro, en la komenco folion, montrantan ĉiujn indikojn por la plua serĉado.

Certe, kvankam la ĝenerala*ŝiemo de ordigo celas kaj helpas kiel eble pleje normigi la tabelojn, ĉiu scienco havas sian propran materialon lingvan (objektojn, kvalitojn, funkciojn) kiujn oni devas bonege koni en ĝia konsisto kaj rilatoj, por scipovi ellabori el ili la plej taŭgan kaj evolupovan sintezon inter formo kaj enhavo.

Mi aparte konsentas, ke la tabeloj, kiel ili prezentigaĵas nun (v. la 2 specimenojn) malgraŭ granda laboro da rikoltado kaj selektado, aperas ankoraŭ ne-

multe pli ol fragmentaj kolektoj da sinonimoj kun kelkaj derivaĵoj; tre nekompletaj (respondantaj al iom pli da radikoj ol en *E. GROSJEAN-MAUPIN – G. WARINGHIEN* 1964), ĝuste por eventuala eldonprovo. Ankaŭ la difinoj, kopiitaj de la vortaroj kaj starantaj unuope, montras nur vidopretan sintezon, ne la eblecojn efektivegblajn per ilia organizado en la tabela interplektiĝo. Tiu laboro estas ankoraŭ preskaŭ ne komencata, ĉar estas necese ĝin verki kun la scienca helpo kaj kontrolo, sen perdiĝi en fantazia cerbumado!

Ĉar, dum plurokaze oni forvojiĝas kaj fermiĝas en la hermeteco, la jena verko celas kunlabori kun la scienco, laŭ la spirito de Esperanto, por faciligi plej eblan klarecon kaj komprenadon.

Referencoj

CASARES, J. (1959): *Diccionario ideológico*. – Barcelona.

DE AGOSTINI–NOVARA, J. (1964): *Vocabulario figurato*. – DUDEN.

ERGOTO (1972): Laŭtema vortaro Esperanto-angla-franca-hispana. 234 p. – Bonaero.

GROSJEAN-MAUPIN, E. – WARINGHIEN, G. (1964): *Plena Vortaro de Esperanto kun Suplemento*. – 511 p. + 63 p. – Paris.

HALLER J. (1969-1977): *Český slovník věcný a synonymický*. – I (1969): 291 p., II (1974): 594 p., III (1977): 709 p. – Stát. pedagog. naklad., Praha.

MIGLIORINI, B. (1961): *Che cos' è un vocabolario?* – Firenze.

Idee essenziali per un progetto di vocabolario sistematico

Credo convenga rilevare anzitutto che il progetto in questione presenta un sistema lessicografico applicabile non solo all' Esperanto, ma a tutte le lingue, con qualsiasi struttura, fra le quali esso può costituire un ottimo mezzo di comparazione.

Nell' uso di una lingua – e specialmente nelle traduzioni – avviene sovente che si debba cercare non soltanto il significato di parole o espressioni singole, ma risalire in senso opposto da una idea o concetto alla corrispondente parola o espressione. Il problema è stato finora solo parzialmente risolto in passato dagli autori dei vocabolari "metodici", lasciando insoluta la parte che riguarda appunto le parole astratte, gli aggettivi e i verbi, che costituiscono l'aspetto più difficile del problema.

Ora, partendo dal principio naturale dell' "associazione di idee", appare come logica conseguenza la loro presentazione sintetizzata in altrettanti "campi semantici" (cioè: regioni di significanti) che individuino un corrispondente numero di tavole sinottiche, contenenti ciascuna il suo insieme di sinonimi riferentesi ad uno stesso tema, con le loro definizioni distintive inquadrate all' esterno da quelle generiche.

(daŭrigo sur p. 142)

Tem-tabelo Pe 2: SANGA PARENCECO

2.1. individuo en familia paren caro

parenco

persono, havanta kun aliaj komunan antaŭulon

paren caro

tuto de la parencoj

familio

aro, konsistanta el gepatroj kaj gefiloj kaj eventuale el aliaj proksimaj parencoj

genealogio (genealogia arbo)

deven-tabelo de la gento-membroj

deveno laŭ rekta linio:

prageavoj

pragepatroj de la gepatroj

geavoj

gepatroj de la gepatroj

gepatroj

patro kaj patrino

gefiloj

infanoj de la gepatroj

genepoj

infanoj de la gefiloj

pragenepoj

infanoj de la genepoj

deveno laŭ flanka linio:

unuagrada:

geonkloj

gefratroj de la gepatroj

gefratoj

gefiloj de la samaj gepatroj

ĝemeloj (plurnaskitoj)

idoj, naskitaj sam-akuŝe

vir(in)o, perdinta sian kunul(in)on pro morto

leĝe rompi, nuligi geedzecon

duagrada:

gekuzoj

gefiloj de la samaj geonkloj

(ili povas esti tria- kvara- kaj pli-gradaj)

prefiksoj por la sanga parenceco:

pra-

esprimas la pli malproksiman gradon de parenceco, ĉu antaŭa, ĉu posta

ge-

esprimas la paron ambaŭseksan

individuo de nenormala fileca stato:

pro gepatra seniĝo:

orf(in)o

knab(in)o, kies gepatroj frue mortis

pro neleĝa gepatra kuniĝo:

bastard(in)o

infano, naskiĝinta ekster laŭleĝa geedzeco

kognato

familiano el la virina devenlinio

agnato

familiano el la vira devenlinio

rimarkigo:

la vortoj, rilatantaj al naskiĝo, troviĝas en la tem-tabelo Pe 1

2.2. pli vasta parenkaro

raso

tuto de la sinsekvaj generacioj de unu sama familio, rigardata kiel devenanta de unu sama prapatr(in)o

gento

grupo el pluraj familioj, posteularo de unu sama praulo, kune vivantaj kaj regataj de unu sama estro

klano

en sovaĝaj socioj grupo da individuoj, kiuj rigardas sian parencecon per sama totemo

tribo

ĉe antikvaj popoloj kuniĝo genta aŭ klana

2.3. adjektivoj

parenca

samdevena aŭ samkategoria

samsanga

deveninta el samaj prauloj laŭ rekta linio

familiara

intima, konfida, senceremonia

2.4. verboj

adopti

alpreni per speciala leĝa akto kiel fil(in)on

generi

produkti samspecan idon

Rimarkigo: la vortoj, rilatantaj al sanga parenceco, troviĝas en la tem-tabelo Pe 2.

SCIENCA REVUO

MERITAS LA ATENTON
DE VIALOKA SCIENCA INSTITUCIO.

ABONIGU ĜINI!

Tem-tabelo Pe 3: EDZIĜA PARENCECO

3.1. individuo en stato soleca

primitiva:

fraŭl(in)o

vir(in)o, kiu vivas sola, ankoraŭ ne edz(in)iĝinta

poredziĝa:

fianĉ(in)o

vir(in)o, promesinta edz(in)iĝi

eksedziĝa:

vidv(in)o

vir(th)o, perdinta sian kunulon pro morto

3.2. individuo en stato edziĝa

leĝa: (por kunvivado kaj por fondo de familio)

edzo

viro, laŭleĝe ligita kun virino

edzino

virino, laŭleĝe ligita kun viro

neleĝa:

konkubo

viro, neleĝe kunvivanta kun virino

konkubino

virino, neleĝe kunvivanta kun viro

3.3. peredziĝa parenceco

bogepatroj

gepatroj de la edz(in)o

prefikso por la edziĝa parenceco:

bo-

bogefratoj

gefratoj de la edz(in)o

bogefiloj

edzo de la filino, edzino de la filo

INTELESKO INTELESKO INTELESKO INTELESKO INTELESKO
INTELESKO INTELESKO INTELESKO INTELESKO INTELESKO INTE-
LESKO INTELESKO INTELESKO INTELESKO INTELESKO INTELESKO
INTELESKO INTELESKO INTELESKO INTELESKO INTELESKO INTELESKO INTE-
LESKO INTELESKO INTELESKO INTELESKO INTELESKO INTELESKO INTELESKO
INTELESKO INTELESKO INTELESKO INTELESKO INTELESKO INTELES-

3.4. pli vasta edzeco

haremo

aro de la islamaj edzinoj

3.5. adjektivoj

virga

ne ankoraŭ spertinta seksan kuniĝon

ĉasta

detenanta sin de neleĝaj aŭ nur plezurdonaj seksrilatoj

malĉasta

sekse diboĉema

3.6. verboj

adulti

peki kontraŭ la geedza fideleco

sang-adulti = incesti

diboĉi

malmodere, malĉaste vivi

prostitui

devigi iun, disponigi sian korpon al aliaj homoj por neleĝaj seksrilatoj

svati

profesie edziĝ-proponi iun kaj helpi, por aranĝi geedziĝon

separi

decidi pri disigo de la geedzoj

divorci

leĝe rompi, nuligi geedzecon

SCIENCA REVUO

ESTAS ABONINDA
DE MULTNOMBRAJ INSTITUCIOJ
DE LA TUTA MONDO!

Ocorre anche notare che quest'ordine di esposizione, essendo fondato sulla realtà stessa e sulle conoscenze scientifiche, risulta identico per tutte le lingue, sostituendo naturalmente tutti i vocabolari "traduttivi" bi- e plurilingui, poiché in ogni caso basterà – come nel DUDEN – la copia sistematico-alfabetica, normalmente appaiata nello stesso volume.

Certo, benchè lo schema, in base all' accennato principio di orientamento aiuti a "normalizzare" il contenuto delle tavole sinottiche, ogni scienza ha il proprio materiale linguistico espressivo, estrinsecato in termini di funzioni, qualità, oggetti che si devono conoscere ed aggiornare nella loro consistenza ed evoluzione per poter elaborare la più oggettiva e chiara sintesi tra forma e contenuto; ma, come la geografia offre al servizio di tutti il risultato delle sue esplorazioni e statistiche, così quest' opera, di cui posso presentare il "prototipo" (già in seconda redazione) completo di 330 tavole sinottiche, presenterà – quando sia stata compiuta con la necessaria collaborazione – un aiuto prezioso alla mente umana per trovare il termine adatto a nominare un oggetto specifico, o ad esprimere propriamente l' idea voluta.

TERMINOLOGIA CENTRO DE ISAE

La direktoro de TC-ISAE, akademiano *Rüdiger Eichholz*, havas ekde 1978 novan adreson:

R. R. 1
BAILIEBORO, Ontario
K O L I B O
K a n a d o

Laŭ la germanlingva prospekto "*Landheim deutscher Kultur*", riĉe ilustrita per fotoj, ĝi impresas vere idilie. La terminologia aktivado de ISAE kresku kaj disfloru sur tiu ĉi bona grundo!
